Gazeto Andaluzia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

N-ro 23 * 6-a Jarkolekto * MAJO '89



FEDERICO GARCÍA LORCA

SANGA NU

KAJ

LA

BERN



Federico GARCIA LORCA

en ESPERANTO

FUENTE VAQUEROS, la 15-an de Aprilo de 1989

GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D.JOSE GARZON RUIZ en San Fernando (Cádiz) 1910.
Organo Oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO. REDACCION: C/ SOL 75 41003 SEVILLA
DIRECCION POSTAL: Apartado 12.209. 41080 SEVILLA. TELEFONO: 95-441-58-54
DEPOSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPYUR. Cuesta del Rosario 14 SEVILLA
DIRECTOR: José María RODRIGUEZ HERNANDEZ. REDACTORES: Francisco José NIEVES PAVON. Pedro José GOSALVEZ OLMO.

DIRECCIONES DE INTERES

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuigo
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado 12.209. 41080 SEVILLA

Grupo de Esperanto de MALAGA
Apartado de Correos 3275
29080 MALAGA

Asociación SEVILLANA de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación CORDOBESA de Esperanto
Apartado 611 14080 CORDOBA

Grupo Esperantista de JEREZ
Apartado 320 JEREZ (Cádiz)

Grupo Esperantista de TORROX
Apartado 13 TORROX (Málaga)

Grupo Baha'i de Amistad Esperantista
Apartado de Correos 280
LA LINEA DE LA CONCEPCION (Cádiz)

Asociación Sevillana de Jóvenes Esperantistas
C/Virgen de la Antigua 4, bajo
41012 SEVILLA

Sección Andaluza de Jóvenes Esperantistas
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Curso de Esperanto por Correspondencia
Apartado de Correos 864
29080 MALAGA

ENHAVO

PAGO

Cefartikolo 1
Fuente Vaqueros je la 5-a ptm 2
Informoj 4
Esperantista Monda Centro en Bjalistoko .. 6
Rezolucio de la 49a Hispana Kongreso de Esperanto 7
El Rocío 8
7a Andaluzia Kongreso de Esperanto 11
Andaluzia Poezio 12
E=mc² * Scienca Pago .. 13
Mun Ni 14
Saklud-Problemo 15
Moromurcio de Honor ... 15
Krucvortenigmo 16

SUR LA KONTROKOVRILO VI TROVOS la unuanpagon de la Esperant-lingva Atlaso de Andaluzio, ĝi temas pri serio da mapoj kiujn GAZETO ANDALUZIA aperi--gos en sia lasta pago. Per ili ni intencas eldoni esperant-lingve la geografiajn nomojn de nia lando.
Tiel en venontaj numeroj ni apo-rigos mapojn de ĉiuj provincoj, montoj, riveroj, ktp.

DEPOSITO LEGAL MA-1.136/86

Los pagos a la Asociación Andaluza de Esperanto deben realizarse a través de la Cuenta Corriente 13.837.147 de la Caja Postal de Ahorros.

ĈEFARTIKOLO

POST CENT JAROJ ...

Post cent jaroj ĉiuj senhare, tion asertas saĝa hispanlingva proverbo esprimante ke nenio povas daŭriĝi dum multe da tempo kaj ke eble multfoje pruvi redakti agad-planojn por multaj jaroj estas reva afero. Tamen malgraŭ ĉi aserto estas necese diri ke almenaŭ en nia movado nenio estos sukcese plenumebla se ni ne unue planas nian agadon. Ni devas jam forlasi la amatoran agadon rilate la disvastigon de Esperanto kaj forgesi la ne-konstantan instruadon de la lingvo. Agadu ni laŭ tre difinita kaj diskutata plano kaj ni atingos almenaŭ etajn sukcesojn. Tion jam komprenis la Estraro de UEA -la internacia E-organizo- kiu proponas por diskutado novan strategian planon bazata sur la nuntempaj rimedoj, homaj fortoj kaj la neceso subteni bonfartan financon por apogi ekonomie la movadon.

Kaj kio okazas en Andaluzio? Ĉu ni havas strategian planon? Ĉu ni havas almenaŭ planon? NE, ni agadas laŭ tagaj problemoj. Ni devus serĉi kaj proponi plenumendan agad-planon, ne tiel grava kiel tiu de UEA, por antaŭenirigi Esperanton en Andaluzio; ne rajtas postvivi kiel vegetaĵo, ni devas plenumi konkretajn punktojn, do ni unue devas redakti ilin. La venonta andaluzia kongreso ĉe Torokso, kiu prezentiĝas kiel profesia renkontiĝo por serĉi solvojn kaj ne tiom kiel turisma afero, devus redakti agad-planon. Ne estas necese sekvi malfacile atingeblajn celojn, tute ne! Ni bezonas nur plenumeblajn projektojn kiuj permesos nin komprenigi kial indas labori por Esperanto. Andaluzio estas granda tero, siaj geesperantistoj kapablas plenumi ĉion kaj la monaj rimedoj, se hodiaŭ ili preskaŭ ne ekzistas, ni ja scias kien serĉi ilin.

De antaŭ kelkaj jaroj la kursoj en Andaluzio okazas ne-regule, unu jaro oni organizas tri aŭ kvar kursojn kaj en la venonta oni ne trovas profesorojn; same okazas rilate la monajn rimedojn, eble ni estas la sola kultura organizo en Andaluzio kiu eblas fari ion ricevante eĉ ne unu pezeton de la Stato aŭ de alia oficiala aŭ privata instanco. Kaj malgraŭ ĉi ĉio la antaŭeniradon de Esperanto en Andaluzio videblas

Resume oni povas aserti ke strategia plano estas necesa ankaŭ por AEU. Tiel labori estos pli facile kaj fruktodone. Ĉu ni sukcesos prezenti Esperanton en Andaluzio kiel lingvon tute normala kaj lerninda? Jesja, sed ni nur atingos tion se ni laboras profesie. Sekvi strategian planon estas tute necese se ni deziras daŭrigi, kaj se eble pligrandigi, nian laboron.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

FUENTE VAQUEROS
JE LA KVINA POSTTAGMEZE

Antaŭ kelkaj monatoj estrara-- noj de nia asocio ekpensis pri la ebleco donaci al la Muzeo "Federico García Lorca" en Fuente Vaqueros (Granado) la verkojn de la granada poeto tradukitaj en esperanton. La tuja respondo de la Direktoro de la Domo-Muzeo ne nur akceptante la ideon sed ankaŭ invitante al ĉiuj geespe-- rantistoj viziti la domon kie naskiĝis Lorka, igis necese pripensi la organizadon de prelego kaj vizito samtempe al la donaco de la libroj.

La dato finfine elektata por ĉi akto estis la 15-a de Aprilo, finfine mi diras ĉar oni devis forgesi aliajn datojn ne taŭgaj por la Muzeo aŭ por ni mem. Do tiu sabato 15a de Aprilo grupe-- toj de gesamideanoj de Seviljo, Malago kaj Kordovo renkontiĝis en Fuente Vaqueros; multaj el ili profitis la matenon por vi-- ziti Granadon, ekzemple la malaga grupo kiu eĉ luis buson por transporti la malagajn partoprenantojn ĝis Granado. La horo elektata por komencigi la akton estis la 5-a horo, kiam komenciĝas preskaŭ ĉiuj aktoj omaĝe al Lorka, memoru tiun poezion "*Je la kvina posttagemeze...*"

La programo estis tre simpla, unue okazis vizito al la domo, tie ni havis la ŝancon vidi ne nur la hejmon kie naskiĝis Lorka sed ankaŭ koni la etoson, ĉar ĉio tie, mebloj, dekoracio, ktp, memorigas la tempon vivata de Federiko, tio ebligas ke eĉ la plej kaŝita domangulo restas nuntempe kiel estis antaŭ 60 jaroj kiam Lorka vivis. Post la vizito, en la grenejo de la domo, hodiaŭ belaspekta kunvenejo, okazis prezento de la akto. Juan de Loxa, direktoro de la Domo, parolis pri la graveco traduki la Lorkajn verkojn en idiomon vere internacia, ilo kiu ebligos alporti la granadan aŭtoron eĉ ĝis la plej fora angulo de la mondo. Post la prezento la prezidanto de AEU, Juan de Dios Montoto, parolis pri la verkoj de Lorka tradukitaj kaj pri la intenco de nia regiona asocio disvastigi kiel eble plej efike kaj dise la verkaĵojn de la andaluziaj aŭtoroj.



Post ĉi du prezentoj okazis la centra konferenco de la programo. La temo estis "Traduko de la Lorka verkaro en la internacian lingvon Esperanto", por prelegi nia asocio kompreneble invitis al la tradukanto de "Sanga Nupto" kaj "La Domo de Bernarda Alba", nia samideano kaj bona amiko Miguel Fernández Martín, kiu krome estas granadano. Li afable akceptis, tamen

pro grava malsano de familiano li fine devis rezigni sian ĉeeston. Malgraŭ tio li redaktis konfe-- rencon por esti legota okaze de la akto. Do, fine kvankam Miguel Fernández ne povis veni al Fuente Vaqueros, sia prelego estis lega- ta de nia samideano José María Ro dríguez. La konferenco estis alt- kvalita, rezumon vi trovos en alia artikolo en ĉi tiu revuo kaj la kompletan tekston, laŭdire es- tos eldonata de AEU. La prelego estis plena je lorkaj tekstoj tradukitaj esperantlingven, kiuj estis deklamataj de nia samideano Manuel Hernández.



Preskaŭ unu horo dauriĝis la prelego, kiu estis son- kaj video bendigata de la Muzeo. Entute ĉe- estis la konferencon pli ol 50 ge samideanoj kune kun la urbestro de Fuente Vaqueros kaj kelkaj es- plorantoj de la vivo kaj la ver-- koj de Federiko García Lorka.

Post la konferenco oni publike donacis la du librojn kaj la es-- traro de la Muzeo invitis al ĉiuj trinki freŝan trinkaĵon kaj vidi kelkajn videobendojn pri Lorka. Kompreneble ni fotis ĉiujn, tra ĉi tiu artikolo vi trovos kelkajn fotografaĵojn. La akto finiĝis je la 8-a horo, tiam ni revenis hejmen, ni ricevis kelkajn do-- nacetojn de la Muzeo kaj la pro- meson daŭrigi estontajn kontak- tojn.

Mi pensas ke ĉi akto estis ja sukcesa, ĉeestis pli ol 50 per- sonoj, t.e. eĉ pli ol al la an- daluziaj kongresoj; la propa-- gando estis abunda ĉefe per ĵur naloj kaj dank' al beleta bro-- ŝureto eldonita de la Muzeo por prezenti la akton kaj enhavanta esperantlingvan tekston *"Verda ĝin mi volas verda ..."*

Nu, ni ĉiuj esperas ke ĉi tio estas nur la unua publika akto de AEU kunlabore kun kultura fonduso por disvastigi la anda- luzian kulturon pere de la in-- ternacia lingvo. Pripenseblaj sendube estus samaj vizitoj ĉe domo-muzeoj de aliaj aŭtoroj, ekzemple tiu de Juan Ramón Ji-- ménez.

Ĝis alia vizito al alia loko ni ĉiuj esperu sukcesigi ankaŭ ĉimaniere la internacian ling-- von Esperanto.



INFORMOJ

Ĉi-paĝe ni unue pensis publikigi resumon de la koferenco de Miguel Fernández, prelegita en Fuente Vaqueros (Granado) sub la temo "Traduko de la Lorka Verkaro en la internacian lingvon Esperanto ".
Lastmomentaj kaŭzoj farigas neebla la publikigado, pro tio ni aperigos tiun interesan resumon en la venonta numero de nia revuo.

BILBAO'A KONGRESO

Okazis en la monato Julio la 49a Hispana Kongreso de Esperanto, pri la ĉefa konkludo vi povos legi en alia paĝo. Tamen eble la plej grava novaĵo por la hispana E-Movado estas la renovigo de la Estraro de HEF. Nia revuo deziras gratuli ĉiujn kiuj akceptis novajn respondecojn por disvastigi nian lingvon kaj speciale niajn samregionanojn Alberto Franco, nova Vic-prezidanto de HEF, Manuel López, Aganta Sekretario, kaj Luis Gilpérez, Vic-Sekretario. Ili kun la nova Prezidanto S-ro Alonso Nuñez gvidos la hispanan movadon dum la venontaj jaroj.

ESTONTAJ EKSKURSOJ

En la pasinta monato Aprilo AEU komencigis serion da ekskursoj **por niaj membroj kaj geamikoj, kiuj intencas ne nur disvastigi iomete la lingvon sed ankaŭ plifortigi la amikecon inter nia membraro.** Tiu unua vizito okazis en la urbo Fuente Vaqueros (Granado). Sed notu bone la estontajn vizitojn kiuj okazos unue en la fino de ĉi tiu jaro al la Natura Parko Donajno en Hŭelvo; kaj komence de la venonta jaro al la konstruaĵoj de la Universala Ekspozicio de Seviljo Ekspo '92.
Ĉu vi jam estas preta vojaĝi denove kun ni?

KURSO EN MALAGO

Dum ĉi tiu jaro okazis en Malago elementa kurso de Esperanto organizata de la loka grupo kune kun la kultura sekcio de la Hispanaj Fervojoj RENFE. Ĉi kurso finiĝis sukcesege antaŭ kelkaj monatoj kaj estis deko da gelernantoj kiuj sufiĉe flue povas paroli nian lingvon. Ni esperas vidi ĉi ĉiujn novajn gesamideanojn dum la ILEI ekzamenoj en Torokso.

TRADUKO SERĈATA

AEU serĉas kvalitan tradukaĵon de la ĉefa verko de la hŭelva poeto Juan Ramón Jiménez, t.e. PLATERO Y YO. Se vi scias ĉu iufoje pruvis traduki ĉi verkaĵon bv. kontakti kun ni, ĉar nia asocio emas serĉi apogojn por eldoni ĝin.

ESPERANTO - EKSPO '92

Nia asocio konscias pri la limigataj fortoj de nia movado por prezentigi ĉe la Universala Ekspozicio okazonta en Seviljo dum la jaro 1992. Tamen ni ne povas resti dormemaj kaj do ni devos fari ion. Pro tio ni kontaktos kun la responde--

culc de la paviljono de UNESKO por atingi lokon por organizi mal grandan ekspozicion pri kio estas Esperanto ene de ĉi tiu interna-- cia paviljono.

CURSO POR CORRESPONDENCIA

Recuerda que la AEU imparte un curso elemental de Esperanto por correspondencia. Contacta con este curso en el apartado de co-- rreos 864 de Málaga.

★ ★

TUS MEJORES VACACIONES JUNTO AL MAR EN LA COSTA DEL SOL las podras disfrutar del 1 al 15 de Octubre de 1989 en un ambiente esperantista en la Residencia de Verano de Torrox-Costa a pocos metros de la playa. Habitaciones de 2-3-4 ó más camas y pensión completa (Desayuno, comida y cena) por sólo 2.000 pts día/persona, 1.500 pts para los niños. Está pre-- visto desarrollar alguna actividad esperantista -curso, conferencias-, así como alguna excursión por los pueblos veci-- nos -la Axarquía malagueña-. Igualmente durante los días 12 al 15 tendrá lugar en esa misma residencia el 7 Congreso Andaluz de Esperanto al que también podrás asistir, (ver página 11)

Más información la podrás recibir si escribes al Apartado 13 de TORROX (Málaga) o bien directamente en los teléfonos:
* 952-25-09-76 * 952-53-04-81

- -

LA PLEJ BONAJN FERIAJN TAGOJN TUJ APUD LA MARO EN LA SUNA MARBORDO EN HISPANIO vi povos ĝui de la 1-a ĝis la 15-a de Oktobro ĉe esperantista etoso en la Somer-Restadejo de Torokso (Malago) tuj apud la plaĝo. 2-3-4 aŭ pli-litaj ĉambroj kaj kompleta pensiono , t.e. matenmanĝo, vespermanĝo kaj nokt tomanĝo nur po 2.000 pesetoj ĉiupersone tage, 1.500 por infanoj. Oni planas aranĝi ankaŭ kelkajn esperantistajn aga-- dojn, kurson, prelegojn, kaj ankaŭ ekskurson tra la apudaj vilaĝoj -la malaga aksarkio-. Fine dum la tagoj 12a ĝis 15a okazos la 7a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiun vi ankaŭ povos ĉeesti kaj partopreni, (vd paĝon 11an)

Pliajn informojn petu adresante al la Poŝtkesto 13 en Torrox (Malago) aŭ rekte per la jenaj telefonoj:
* 952-25-09-76 * 952-53-04-81

ESPERANTISTA MONDA CENTRO EN BJALISTOKO

Unu el la plej gravaj decidoj de la 72-a Universala Kongreso de de Esperanto, okazita en Varsovio en 1987, estis la plano konstrui en Bjalistoko (Pollando), la urbo kie naskiĝis la D-ro Zamenhof, Mondan Esperanto-Centron aŭ Centron Zamenhof. La ideo estis lanĉita fare de la alta protektanto de la varsovia kongreso, pola parlamentestro Roman Malinowski. Unu jaron poste oni fondis la Fondumon Ludoviko Zamenhof, kies celo estos konstruigi la Centron kun la helpo de la Stato kaj de internaciaj kulturaj asocioj. La reprezentantoj de Bjalistoko baldaŭ akceptis la ideon kaj tiel la Urbestro, nome de la urbo, donacis 5-hektaran parcelegon. Oni ellaboris duvojan kolektadon de propo-noj, unuflanke de UEA mem kaj alie de la Bjalistoka Urbodomo.


Kompreneble la Esperanto-Movado ne povas memstare financi la entreprenon, kaj jen la ĉefa problemo, por tio oni jam petis helpojn al multaj internaciaj instancoj, oni jam pripensis ideojn por pligrandigi la mon-rimedojn kaj eĉ oni jam akceptis gravajn kaj etajn donacojn.

La rolo de estonta Monda Esperanto-Centro estas ja gravega, sendube kiam oni konstruigos ĝin la Centro estos la kerno de kulturo internacia esperantista, oni jam planis la konstruon de la plej grava E-Biblioteko, organizado de kursoj kaj seminarioj de la internacia lingvo universitat-nivele, kaj eĉ la preparo de radio aŭ televid-elsendejo. Sed krome de konstantaj aferoj ankaŭ estos tre grava la organizado de konferencoj, teatro-prezentoj, preparo de eseoj, ktp en esperanto. Ebleĝi estos kiel la fonto de kulturo kaj la loko nepre vizitenda por perfektigi nian kulturscivolemon rilate Esperanton.

Sed ĉefe ĝi devos esti vivanta centro, ne muzeo, oni diras ke ĉi projekto estas pli grava ol miloj de Zamenhof-monumentoj el ŝtono kaj por tio ekde nun UEA petas helpon al ĉiuj E-klubboj enla mondo, ne nur per mono sed ankaŭ per ideoj kiuj havigos monon por la konstruado kaj kiuj plenigos la murojn de la estonta centro per agado servanta la ideon de Zamenhof pri tutmonda interkompreniĝo.

(Redaktita laŭ informoj aperitaj en diversaj gazetoj, ĉefe en HEROLDO DE ESPERANTO).-

Bildo de la plano por la konstruo de la estonta CENTRO ZAMENHOF.



RESOLUCION DEL 49 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO, QUE TUVO LUGAR EN BILBAO DURANTE LOS DIAS 19 AL 23 DE JULIO DE 1989.

1) El colectivo esperantista, que existe desde hace ya un siglo, constituye un grupo social interesado y dedicado a la labor cultural consistente en el cultivo y uso de la Lengua Internacional Esperanto.

Como tal grupo social goza de los mismos derechos a la atención y protección por parte de nuestras instituciones que los demás grupos sociales dedicados a actividades culturales o de otro carácter.

Tal atención y protección no se da en general, y en todo caso siempre tienen lugar de manera relativamente discriminatoria.

Por tal motivo este Congreso y los ciudadanos de pleno derecho que lo constituyen solicitan y esperan de nuestras instituciones que en los sucesivo les dispensen la atención y protección que precisan y a que tienen derecho.

2) El Congreso constata que además de las personas directamente activas en el cultivo y uso del Esperanto, existe un número creciente de jóvenes que desean aprenderlo en igualdad de condiciones y validez académica que las demás lenguas.

Por tal motivo el Congreso solicita de nuestras autoridades educativas que se tomen las medidas oportunas a fin de que dentro de los actuales planes de enseñanza que prevén el estudio de dos lenguas extranjeras se incluya el Esperanto como una alternativa más elegible por parte de los alumnos.

★ ★ ★ ★ ★

REZOLUCIO DE LA 49a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO, OKAZINTA EN BILBAO DUM LA TAGOJ 19a GIS 23a DE JULIO 1989.

1) La esperantista kolektivo, ekzistanta jam de unu jarcento, konsistigas socian grupon interesiĝantan kaj dediĉantan al la kultura tasko flegadi kaj uzadi la Internacian Lingvon Esperanto.

Kiel tia socia grupo, ĝi ĝuas la samajn rajtojn al atento kaj protektado fare de niaj institucioj kiel la ceteraj sociaj grupoj dediĉataj al kulturaj aŭ alitipaj agadoj.

Tia atento kaj protektado ne okazas ĝenerale, kaj ĉiukaze temas pri relative diskriminacia atento.

Tial la Kongreso kaj la plenrajtaj civitanoj kiuj ĝin konsistigas petas kaj esperas de niaj Institucioj ke ekde nun ili provizos al ili la bezonatajn kaj rajtajn atenton kaj protektadon.

2) La Kongreso konstatas ke aldone al la homoj rekte aktivaj en la flegado kaj uzado de Esperanto, ekzistas kreskanta nombro da gejunuloj dezirantaj ĝin lerni sub la samaj kondiĉoj kaj akademia valideco kiel la ceteraj lingvoj.

Tial la Kongreso petas de niaj edukaj aŭtoritatoj ke ili faru la oportunajn aranĝojn cele al tio, ke en la kadro de la nunaj instruplanoj antaŭvidantaj la studadon de du fremdaj lingvoj, Esperanto iĝu plia elekto-al-ternativo por la gelernantoj.

EL ROCIO


El Rosio estas vilaĝeto en la urbo Almonto ĉe la provinco Huelvo, okcidenta parto de Andaluzio. Verŝajne vilaĝeto kun 600 enloĝantoj kiu stariĝas apud la Natura Parko Donjano ne meritus aperi en iu gazeto, se ne okaziĝus tie la plej amasa manifestacio elmontrante korinklinon al la Virgulino Maria, laŭ la katolika religio la Patrino de Dio; la Pilgrimado al la Sanktejo de la Virgulino de El Rosio.

La Sanktejo troviĝas apud la rivereto Rocinas. La historio de ĉi tiu loko havas diversajn originojn; tiu kiu ŝajnas pli kredebla estas tiu kiu asertas ke la bildo de la Dipatrino estis kreata en la 13-a Jarcento. Dum tiu epoko oni starigis en la sudo de Hispanio multajn sanktejojn en la limo inter kristanoj kaj islamanoj, por alvenigi novajn kristanajn enloĝantojn en tiujn senhomajn terojn.

Alfonso la 10-a, saĝa reĝo kaj ĉasisto, estas la unua kiu parolas pri ĉi tiu Sanktejo, ti el en sia "Libro de la Montería" (Libro pri Ĉasado) li diras: *"En la tierra de Niebla hay una tierra quel dicen las Rocinas et es llana et es toda sotos et hay siempre hi puercos... et se ñaladamente son los mejores sotos de correr cabo de un iglesia que dicen Santa Maria de las Rocinas".* (En la zono nomita Niebla estas loko nomita Rocinas, ĝi estas ebenaĵo kiu havas arbarojn kaj tie ĉiam estas sovaĝaj porkoj... kaj ĉefe la plej bona loko por ĉasi estas tuj apud preĝejo nomita Sancta Maria de las Rocinas).



↑ Pilgrimantoj en la Rivero Kema




↑ Pilgrimantoj kaj kaleŝoj

La desegnaĵoj kiuj aperas en ĉi tiu artikolo estis desegnataj de nia segovia samideano CESAR DE MOSTEYRRIN, okaze de pilgrimado al El Rosio en la jaro 1988.

Tamen la bildo de Sankta Maria de las Rocinas baldaŭ estis kaŝigata ene de arbo por eviti la profanon de la islamanoj kiuj konstante invadis la lokon. Kaŝita restis la bildo ĝis la 15-a Jarcento kiam Gregorio Medina, ĉasisto de Viljamanriko, trovis ĝin. Baldaŭ la jus trovita bildo allogis la atenton de la enloĝantoj de tiu regiono. Post la eltrovo kaj la konstruo de la preĝejo en la 18-a Jarcento ekzistis en la vilaĝeto, laŭ la arĥivoj, apud la domoj de la ĉasistoj, specialaj konstruaĵoj starigitaj de pilgrimantoj de Viljmanriko, Roto kaj Pilas'. Dum ĉi tiu jarcento la Sanktejo de Sankta Maria de las Rocinas estis la plej sankta kaj vizitata loko de la paŝtistoj de Almonto kaj la ĉasistoj de apudaj vilaĝoj. Baldaŭ aperis novaj grupoj de pilgrimantoj en la regiono kaj tiel en 1758 fideluloj de Almonto ellaboris la unuajn regulojn, redaktitaj laŭ la tradicioj kaj kutimoj de la pilgrimantoj.



€ Kaleŝo de la Simpekado de la Kunfratigo de La Savinto de Seviljo.



↑ Kaleŝoj en Sanlukar' (Kadizo)

Hodiaŭ la Pilgrimado de El Rosio superis ian alia katolika manifestacio en Hispanio kaj eble en la mondo. En 1988 estis preskaŭ cent kunfratiĝoj de pilgrimantoj kiuj dum la monato Majo iris al El Rosio. Entute estis pli ol unu miliono da personoj tiuj kiuj renkontiĝis dum tri tagoj por vidi *La Blankan Kolombinon*, popola nomo de la Virgulino de El Rosio. Nombraj kutimoj respektataj kvazaŭ leĝoj fare de la pilgrimantoj provokas ke vizito al El Rosio estas ion malfacile forgesebla.


La voj-irado, preskaŭ tiel grava kiel la vizito al la Virgulino, dum kiu miloj da pilgrimanto iras al la vilaĝeto rajdante ĉevalojn, sur kaleŝoj aŭ piede, estas vivanta pruvo de frateco inter personoj de la plej diversaj lokoj kaj sociaj grupoj kiuj renkontiĝas dum la voj-irado kaj en la Sanktejo sub unu sama elkrio: "*Vivu la Virgulino de El Rosio. Vivu la Blankan Kolombinon*".

Sed kion signifas la Pilgrimado al la Sanktejo de la Virgulino de El Rosio? Antaŭ ol respondi ĉi demandon estas necese antaŭscii ke malfacile estas kompreni popolan manifestacion se oni antaŭe ne fariĝas popolo mem aŭ ne partoprenas en la festo. Plejeble se ni ne agas tiel ni pensos, kiel multaj aliaj personoj, ke El Rosio estas nur *bela kunigo de pagana festo kie troviĝas* kristana *elemento: la Dipatrino.* Tamen ni ne pensas same, ne ekzistas en la Pilgrimado la pagana elemento, sed male ekzistas sincera kaj popola manifestacio ĉe la Virgulino vidante ŝin kiel ion apuda kaj eĉ familia, vidpunkto kiu ebligas nomi la Dipatrinon: la Blankan Kolombinon. Verŝajneĉi tia manifestacio estas la maniero kompreni universalan religion fare de konkreta popolo: la andaluzia.

Aliamaniere oni ne sukcesos kompreni la magnetismon de bildo, de Sanktejo kaj de vilaĝeto kiu allogas la atenton de milionoda personoj de la plej foraj lokoj.

Karavanoj de kaleŝoj tirataj de bovoj, rajdantoj sur ĉevaloj, rosiaj vestaĵoj, pejzaĝo de lagunoj, vino, kantado kaj dancoj ne havas la Virgulinon de El Rosio kiel pretekston sed kiel centran motivon.

J.M.R.H.



↑ Pilgrimantoj kaj kaleŝoj en la rivero Gvadalkiviro ↑





€ Pilgrimantoj tra la Rega Linio (Sabla Vojo)

7-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Torrox (Malago) 12a/15a de Oktobro de 1989

PROGRAMO

JAŬDO 12a Oktobro	Matene →	Akceptado de gekongresanoj
	Vespere →	Malfermo de la Kongreso Oficiala Kunsido pri la nuntempa situacio de AEU. Raporto kaj Debato. Proponoj pri estonta agado. "Nun temas pri..." (1)
	Nokte →	Video "La Graveco de la Fideliĝo" Projekcio de lumbildoj.
VENDREDO 13a Okt.	Matene →	Ekskurso tra apudaj tipaj vilaĝoj.
	Vespere →	"Nun temas pri..." (1)
	Nokte →	Pupteatro de la grupo *Paneveĝisa* de Litovio (Sovetunuiĝo).
SABATO 14a Okt.	Matene →	Defendo kaj debato de la proponoj prezentitaj en la unua kunsido.
	Vespere →	Ekzamenoj de ILEI Muzikkoncerto
	Nokte →	Ĉeesto al la popolfestoj de la apuda vilaĝo Nerja.
DIMANĈO 15a Okt.	Matene →	"Nuntemas pri..." (1) Disdonado de diplomoj Legado de la konkludoj atingitaj en la Kongreso. Fermo de la Kongreso. Adiaŭo.

SAMTEMPAJ ARANĜOJ

Dum la kongreso oni aranĝos ekspozicion de libroj, revuoj kaj E-materialo. Same oni montros kolekton de kovertoj kaj poŝtmarkoj senditaj de la tuta mondo salutante la kongreson kaj ankaŭ pri E-filatelaĵoj.

Oni organizos ankaŭ elementan kurson de la internacia lingvo kaj por tiuj kiuj deziras aĉeti librojn oni aranĝos libro-servon
Por pliaj informoj pri restado bv. vidi la aliĝilon kiu aperas en ĉi tiu revuo.

(1) Por tiuj kiuj ĝis nun ne partoprenis en la andaluziaj kongresoj ni informos ke la programero "NUN TEMAS PRI..." estas serio da prelegoj pri kulturaj, artaj aŭ sciencaj temoj. Ĝis nun oni pripensis la jenajn:

* "Prezento de projekto pri andaluzia ortografio" de Alberto Franco kaj Ricardo F. Albert.
* "Lingvoj en kontakto ĉe ni: la kaloa kaj hispan-andaluza" de A.Franco.
* "Esperanto kaj Admini$tracio" de J.M. Rodríguez.

Tamen ne temas pri fermita programero kaj se vi anoncas tion frue ni pristudos la eblecon prezentigi ankaŭ aliajn prelegojn.

ANDALUZIA
POEZIO

MI VOLUS ESTI SOLA EN LA SUD'

Verŝajne miaj kvietaj okuloj ne pluvidos la sudon
de glataj pejzaĝoj dormitaj en l'aero
kun korpoj sub l'ombro de branĉoj kiel floroj
aŭ en fuĝo rajdante sur furiozaj ĉevaloj.

La sudo estas dezerto kiu ploras dum ĝi kantas
kaj tiu voĉo ne estingiĝas kiel mortinta birdo
ĝis la maro ĝi portigas siajn amarajn dezirojn
apertigante tiklan eĥon kiu vivas malrapide.

En tiu lontana sudo mi volas esti kaŝita
la pluvo tie estas nur rozo duonapertita
sia nebulo mem ridas per rido blanka en la vento
sia obskureco sia lumo estas samaj belaĵoj.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

AMATA VORTO

- KIU estas via prefera vorto?
- Ĉu nur unu vorto?
Kaj kiu povas aldiri respondon?

- Ĉu vi pro la sono ĝin preferas?
- Eble pro ĝia ritmo silenta,
kiu lasas, kiam oni ĝin diras, eĥon kvietan.

- Aŭ ĉu vi pro la signifo ĝin preferas?
- Pro tio kio en ĝi tremas,
atingante la bruston kiel sago vundigema.

- Tiun vorton vi al mi diru.
- Tiu vorto estas: andaluz'.

LUIS CERNUDA.

Luis Cernuda naskigis en Seviljo en 1902, li apartenis al la t.n. grupo poetoj de la jaro 1927. Siaj plej gravaj verkaĵoj estas: *DONDE HABITA EL OLVIDO, LA REALIDAD Y EL DESEO, LAS NUBES Y OCNOS, VIVIR SIN ESTAR VIVIENDO*, kaj aliaj verkoj kie li studas la hispanan literaturon. Li mortis ekziliita en Meksikio en la jaro 1963.

$E = m c^2$ sciencaj paĝoj

Ni povus demandi, ĉu ekzistis iufoje pralingvo? tio estas: la lingvo de la lingvoj; kaj se jes kiel ĝi estis? La profesoro Vytal Shevoroshkin asertas ke ĉiuj lingvoj devenas de unu sama kerna lingvo. Laŭ la sciencistoj la homo aperis sur la Tero antaŭ cent mil jaroj, tamen li ne kapablis paroli ĝis antaŭ sesdek mil jaroj tion pruvas la eltrovo de fosilioj kies gorĝo, kun speciala osto, kapablas paroli aŭ elsendi sonojn pli malpli similaj al vortoj.

La sovetaj profesoroj Illich-Svitych kaj Dolgopolsky anoncis en 1963 la eltrovon de kelkaj similaj vortoj uzataj antaŭ dudek mil jaroj en lingvoj de Azio. Laŭ ili de tiu kerna lingvo devenis 6 el la 10 lingvaj familioj kiuj poste naskigis la nunajn idiomojn, tio estas: la hindoeŭropea, la afrik-azia, la kartvelia, la ural-la, la dravidia kaj la altaika.
La profesoroj nomis tiun lingvon Nostratika (de la latina "noster" nia). Ĝis nun oni eltrovis mil vortojn de ĉi lingvo, krome oni konas kelkajn detalojn de ĝia gramatiko, ekz. la verbo lokiĝis ĉiam fine de la frazo.

Tamen estas necese diri ke ĉi nostratika lingvo ne estas la unua lingvo, ĉar ĝi mem devenus de alia, la vere unua.

La profesoro Shevoroshkin, kiu daŭrigas la studojn de la sovetaj profesoroj, proponas kiel ekzemplon la devenon de kelkaj vortoj tra la nostratika, hindoeŭropea kaj latina lingvo, tiel:

Nostr.	Hindoeŭ.	Latina
AKVO	*HAKU*	*HAKW*	*AQUUA*
HUNDO	*KUJNA*	*K'UON*	*CANNIS*
KAPO	*KAPV*	*KAP*	*CAPUT*


Tamen la nostratika estas nur ŝtupo en la vojo ĝis la unua supozita pralingvo.

La opinioj de la sciencistoj pri ĉi tiu temo estas diversaj. Kelkaj asertas ke la lingvoj sanĝiĝas tre rapide, pli malpli post 5.000 jaroj, t.e. tio kio hodiaŭ estas lingvo, post tiu tempo estos tute ne-komprenebla, ne ekzistos komunaj punktoj. Do serĉi kernon komunan al la nuntempaj lingvoj estas reva afero.

Male, aliaj opinias ke la ekzisto de tiu unua lingvo estus ebla; nordamerikaj sciencistoj parolas pri la graveco de la neŭrologia substrukturo de la lingvoj, kio ebligas pripensi la ekziston de kerna sistemo de la unuaj homaj mensoj.


★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

SOLVO AL LA PASINTA KRUCVORTENIGMO



DEBATO PRI HEJS EN TOROKSO

Dum la 7-a Andaluzia Kongreso de Esperanto kiu okazos en Torokso en la monato Oktobro oni aranĝos debaton inter la ĉeestanta junularo por klarigi la nuntempan situacion de HEJS post la Vitoria kaj Bilbao-a KOngresoj Ni esperas trovi inter ni dum tiu debato gejunulojn kiuj aktive movadas aŭ movadis ĉe HEJS kaj kiuj povos klarigi al ni kiel fartas nun la His-- pana Esperantista Junulara Societo.



SITUACIO DE AEJ

Ankaŭ estos necese difini la labor-liniojn de AEJ por la venontaj 2 jaroj. Ĉu ni estos kapablaj daŭrigi la komencitan laboron? Ĉu ni sukcesus organizi Internacian Junularan Kongreson aŭ ian internacian E-renkontiĝon?

ESTONTAJ IJK-oj

En la venontaj jaroj la Internaciaj Junularaj Kongresoj okazos en:

* 1990 → KUBO
* 1991 → SVEDIO


Videblas ankaŭ IJK en Sud-Koreio por la venontaj jaroj.

LABOR-BRIGADO

En *HEROLDO DE ESPERANTO* ni legas pri la organizo de Junulara Esperanto Labor-Brigado en Bjalistoko (Pollando). Ĉi-jare okazas de la 6-a ĝis la 26-a de Aŭgusto.
Ĉi labor-brigadoj estas planataj kiel ĉiujara aranĝo dum la dek jaroj de la konstruo de la Cen-- tro Zamenhof por ebligi al la monda E-junularo partopreni en tia konstruado. Pliaj informoj:

* Esperanto-Centro.
ul. Lipowa 4 PL-15-540
BIALYSTOK (Pollando).

SAKLUD-PROBLEMO




Blankuloj ekmovas kaj matigas
post 4 movoj.

La solvo en la venonta numero.

★ ★ ★

Krucvortenigmo



Se vi atingas solvi ĉi krucvortenigmon sendu al ni fotokopion de ĉi pago, ĉar ni lotos inter la leteroj ricevitaj la libron "AKSTERIKS LA GAOLO".
Adreso: GAZETO ANDALUZIA. Apartado 12.209 41080 SEVILLA.

HORIZONTALE.–


1.- Reprezentaro de la enlogantoj ĉe konstituciaj landoj. Adverbo signifanta ne nur sed plie.
2.- Malsimpatio. Adverbo signifanta en alta grado.
3.- Konsonantoj de la vorto ANASO. Kelkaj literoj de la vorto JUNIO. Inverse kaj infinitive, gutoj de vaporo kiuj dum la nokto fluidigas sur la vegetaĵojn.
4.- Timego. Vokalo. Agadi ĉe teatra verko.
5.- Akuzative, difinita epoko de kiam oni komencas la kalkuladon de la jaroj. Metala bastoneto provizita per larga kapeto servanta por fiksi objekton, en kiun oni enpuŝas gin. Ne-oficiala sufikso.
6.- Nomo de litero. Organo de mamulinoj en kiu la feto evoluas dum la graved-tempo. Amuzaĵo por nura plezuro.
7.- Vokalo.Konsonanto.Tubo konduktanta la nutraĵojn de la gorĝo gis la stomako.Konsonanto.
8.- Organo de aŭdkapablo. Konsonanto. Konsonanto.
9.- Adverbe, deflankigi de la gusta vojo. Inverse, legoscienco. Verba finaĵo.
10.- Inverse kaj akuzative, tranĉilo por malmola materialo formata per ŝtala klingo provizita per dentoj. Punkto egaldistanca de la ekstremaĵoj. Konjunkcio signifanta en la okazo kiam.
11.- Konsonanto. Sen la lasta vokalo, kritiko. Inverse, ruga frukto.
12.- Inverse, havi rajton uzi ion. Akuzative kaj adjektive, movi ion aŭ iun al si.
13.- Prepozicio signifanta akompanon.Konsonanto.Inv. kaj plur.,poseda pronomo.Konsonanto
14.- Konsonanto. Inverse, sufikso montranta malgrandecon. Adverbo por plifortigi jesigon. Flanka parto de la vizaĝon.
15.- Inverse, aŭdebla aervibrado. Interna parto de la korpo. Inverse, tuto.
16.- Kelkaj literoj de PAFO. Inverse kaj sen la lasta vokalo, mangaĵo farita el ovo. Kelkaj literoj de ANIMO.
17.- Adverbe, monarĥa regnestro. Du samaj vokaloj. Inverse, nomo de litero. Konsonanto.
18.- Sen la lasta vokalo, konigi sian penson per vortoj. Lega generala punliberigo.
19.- Vokalo. Konsonanto. Tri vokaloj. Inverse kaj adjektive, organismo en kiu ĉiuj organoj normale funkcias.
20.- Inverse, afrika besto. Loko por kaŝi.

VERTIKALE.–

1.- Sovaĝa besto. Verko enhavanta la resuman tuton de la homaj konoj.
2.- Palmopieda kortobirdo kun longa kolo. Flava metalo. Cifero. Sin movi sur aŭ en akvo. Konsonanto.
3.- Konsonantoj de la vorto RETO. Nomo de litero. Rompopeco de objekto. Adjektive, ne-prilaborita metalo.
4.- Persona pronomo. Cifero. Kelkaj literoj de SOMERO. Sen la lasta vok., ĉefo.Konsonanto.
5.- Adjektive kaj inverse, kurba osto kiu ĉirkaŭas la bruston. Sen la lasta vok., instru-- mento por observi astrojn. Vokalo. Vokalo. Verba finaĵo.
6.- Malvarma densa saŭco. Konsonanto. Inverse kaj plurale, idoj naskitaj ĉe la sama akuŝo.
7.- Sufikso montranta malgrandecon. Grupo. Unuo de elektra rezistanco de kondukilo. Arbeto kun bonodoraj floroj.
8.- Persona pronomo. Inverse, ĉiu el la okazoj kiam io farigas. Sen la lasta vok. kaj in-- verse nia planedo. Vokalo. Nomo de litero. Demanda adverbo.
9.- Nomo de litero. Vokalo. Kazo deklinacia. Konsonanto. Vokalo.
10.-Vokalo. Inverse, honori iun donante al li grandan famecon. Inverse kaj plurale spirita viviga principo de la homo. Inverse kaj akuzative, estimo.
11.- Inverse kaj sen la lasta vok., parto de la korpo. Du vokaloj. Inverse,nomo de litero. Inverse kaj akuzative, malfacila proponata divenotaĵo.
12.- Inverse kaj adverbe, sentigi al iu tre malagrablan korpan impreson. Melankolio. Kel-- kaj literoj de ORAJ.
13.- Plurale, frukto. Konjunkcio signifanta en la okazo kiam. Konsonanto. Inverse mangaĵo. Nomo de litero.

Adreso: GAZETO ANDALUZIA. Apartado 12,2..

ESPERANT-LINGVA ATLASO DE ANDALUZIO



ANDALUZIO - PAGO 1